# B U L T E N O DE

LABORISTO LIGO ESPERANTISTA EN ČEHOSLOVAKIO

JARABONO POR ČSR Kč 6,- POR EKSTERLANDO 4 RESPONDKUPONOJ POR MEMBROJ DE UNUIGITAJ LIGOJ "L.L.E." PLZEŇ KAJ "Č.L.A.E." ÚSTÍ N/L: SENPAGE.

POŜTĈEKA KONTO DE L.L.E. PLZEŇ 87.136 PRAHA DE Č.L.A.E. AUSSIG A/E: 45729 PRAHA

ADRESO LABORISTA LIGO ESPERANTISTA, PLZEŇ, PEKLO ČSR

12a jarkolekto. Septembro Oktobro 1938


## - Postkongresaj pripensoj. -

K-ý F. Estas kutime dum someraj feriaj monatoj, ke ĝenerale malvigliĝas la organiza vivo. Ankaŭ en niaj laboristaj esperantistaj societoj oni dum tiu tempo mallaboras. Sed ĉi jare ne estis tiel, male ĵus dum tiu somera tempo ni laboris pli forvere, ĉar ni decidis efektivigi la nian I. Tutlandan kongreson de laboristaj esperantistoj.

Nun kiam ĉie oni revenas al ordinara organiza vivo, ni postrigardas nian kongreson kaj devas demandi, ĉu fakte la kongreso estis sukcesa? Jes, oni diros, sed tio ne povas signifi, ke ni ne volas vidi tion, kion la kongreso al ni montris kaj kio devoligos nin zorgi, kiam ni aranĝos IIan kongreson, ke ni eluzu spertojn akiritajn dum la I-a.

La ligaj komitatanoj konvinkiĝis, ke neniam povas malutili pli da serioza laboro por tia entrepreno, kaj ke oni poste vane serĉas perditan tempon, foruzitan en senfrukta diskutado dum la preparaj laboroj.

Tre ni bedaŭris, ke ne ĉiuj niaj anoj povis partopreni kongreson, ĉu pro malproksimeco aŭ pro alia kaŭzo, sed neĉeesto de multaj gekamaradoj lokaj kaj el proksimaj lokoj estas riproĉinda. Tio atestas pri oportuneco aŭ malatento al tia grava entrepreno, ambaŭ tiuj ecoj ne indaj de laborista esperantisto.

El la intertraktado de gekamaradoj dum la kongreso estis konstatebla vere kamaradeca spirito kaj tiuj malgrandaj opiniinterŝanĝoj tre bone instruas nin, kia devas fariĝi la laborista esperantisto, se li certe serioze volas kunlabori al la prospero de sia movado, ĉar por ĉio alia estas nia movado ankoraŭ tre, tre malforta.
Dum la kongreso estis faritaj kelkaj gravaj decidoj: La strukturo de nia LLE. Ne ŝanĝiĝis, tio signifas, ke ĝi ne estas partitendenca kaj ankaŭ alkliniĝis al nenia starantaj esperantistaj laboristaj internacioj. Tio obligas al ĉiuj klaskonsciaj esperantistoj fariĝi ano de nia ligo kaj per tio helpi krei fortan movadon de laborista movado en ČSR. Pri nia "Bulteno" estas decidite eldonadi ĝin dumonate. Ĉu tio devas signifi malfortiĝon de nia movado? Certe ne, sed devas tio instigi la ĉiujn niajn membrojn helpi al plibonige de nia "Bulteno" kion ili faros ne nur se ili ĝin regule regos kaj disvastigos, sed ankaŭ skribos artikoletojn kaj raportojn.

Multaj supozis, ke nia tutlanda kongreso estis aranĝita nur por kompletigi similajn entreprenojn de kulturaj organizoj en la kadro de VI. jubilea laborista ekspozicio en Plzeň. Parte vere estis tiel, sed krom tio estis klopode klarigi kelkaj punktoj speciale koncernantaj la laboristan estperantistan movadon en nia respubliko kaj pro tio deas pardoni la riproĉemuloj, kies deziro estis aranĝi ĝeneralan esperantan kongreson. En mala okazo ili eble ankaŭ riproĉus ke la programeno taŭgas por ĝeneralan esp. kongreson.

Ke jam estis necese aranĝi konvenon de la lab. esperantistoj el tuta respublika pravas la fakto, ke la kongreso decidis, aranĝi la tutŝtatan kongreson ĉiujare, la partoprenantoj de la kongrese tin entuziasme akceptis kaj tio devas esti garantio, ke venontjara kongreso fariĝos pli impona kaj pli multnombre vizitata. Do ĉiuj antaŭen en la laboron!

- Protokolo pri I. Tutlanda kongreso de laboristaj esperantistoj -

La kongreso estis malfermita 6an de aŭgusto dum interkonatiĝ vespereto en societa domo de DTJ. Plzeň II. La vespereton partoprenis krom la plzeňaj esperantistoj ankaŭmultaj gekamaradoj el aliaj lokoj de nia respubliko, plejparte el Nordbohemio. Kiam k-do Baša prezidanto de la ligo malfermis la vespereton, eksonis nacia kaj esperanta himnoj. K-do Baša salutis ĉiujn partoprenantojn, rememoris mortintajn anoj kaj gekamaradojn batalantajn en Hispanio kaj Ĉinio por demokratio, kaj tralegis salutleterojn alvenintajn el en- kaj eksterlando. Poste salutis la kongreson s-ano J.Gross, prezidanto de ORE. /okcidentbohemaj esperantistoj/, s-ano Pytloun, Hradec Králové kaj k-do J. Bergmann el Reinowitz en la nomo de germanlingvaj laboristaj esperantistoj.
La programo de la vespereto estis plejparte muziko kaj recitado, krom tio rakontis s-ano Pytloun, diversajn okazintaĵojn el esperanta movado kaj k-do Bergmann informis ĉeestantaron pri la esperanta movado en Nordbohemio. La vespereto finiĝis per danco.

Dimanĉe la 7. de aŭgusto je la 9. horo antaŭagmeze malfermis k-do Baša en la sama ejo kongresan laborkunvenon kaj legas proponitan estraron de la laborkunveno en kiun unuvoĉe elektitaj kamaradoj: prezidanto K a l n ý F. - Plzeň-Kulturo, I. vicprezidanto J. B e r g m a n n – Reinowitz, II. vicprezidanto O. B a š a – Plzeň-Peklo, protokolisto R. J o n á k – Plzeň-Peklo. Ĉiuj akceptis la funkcion kaj k-do Kalný salutante la ĉeestantaron sciigas la programon de laborkunveno.
La kunvenon salutis: k-do J.Pech, Plzeň, k-do A.Vágner, Plzeň, nome de societo de amikoj de SSSR, s-ano J.Gross, Plzeň, s-ano inĝ. Novák, prezidanto de esp. klubo Plzeň, k-do Janečka, Mutersdorf en la nome de germanlingvaj laboristaj esperantistoj kaj k-do Pelcman, por SAT-rondo en Plzeň.
Raporton pri la laborista esperantista movado en Ĉeĥoslovakio prezentis liga sekretario k-do Jonák. Pri tiu raportoestis debato en kiu parolis k-do Bergmann pri germanaj laboristaj esperantistoj, s-ano inĝ. Novák pri neutrala esperanta movado en ČSR. k-do Pech pri cirkostancoj kiuj malhelpas al nia movado, k-do Frolíšek, Hustopeče, pri la esperanta movado en Moravio.
Proponaj: K-do Pelcman rekomendas por ke nia ligo kunlaboru kun SAT. kaj k-do Valeš en la nomo de Kulturo-Plzeň prezentas proponon, por ke nia ligo aliĝu al Götenburka konvencio. Kontraŭ propono parolis k-do Pech kaj Bergmann, en ion ekscitita debato al tiu temo estis akceptita kontraŭpropono de k-do Janák, ne aliĝi al la Götenburka konvencio. Propono de k-do Pelcman eldonadi ligan "Bultenon" esperanto-ĉeĥo malakceptita, al la "Bultenon" oni eldonados por ĉeĥlingvanoj ĉeĥan aldonon.
Proponon de k-do Valeš, por ke la "Bulteno" estu eldonata dumonato, la kongreso post motivigo de kelkaj k-doj akceptis.
Propono de k-do Jonák, por ke nia ligo unuiĝu ĉiujn laboristajn esperantistojn en ČSR. senescepte de nacieco kaj raso, estis akceptita.
Propono de k-do Bergmann, por ke la ligo eldonu flugfoliojn, akceptita. Plue estis aprobitaj sekvantaj proponoj: de k-do Bergmann, por ke la kongreso de laboristaj esperantisto estuamanĝata ĉiujare. Al tio rekomendas k-doj Pech kaj Frolíšek, se eble aranĝ ĝin en Nordbohemio. De sama k-do, por ke la ligo propagandu per radio, al tie rekomendas k-do Pelcman por ke la ligo pri tio intertraktu kun laborista radio-amatora klubo en Plzeň.
Propono de k-do Janečka, por ke nia movado estu propagandata en ĉiuj laboristaj gazetoj, la liga komitato laŭ ebleco efektivigos.
Ĉar por tio elĉerpiĝis la programo k-do Kalný fermis la laborkunvenon kun alvoko, ke ni ĉiuj pli intensive laboru por nia movado.
Postagmeze vizitis la kongresanoj la VI.jubilean ekspozicion kaj la esperantan ekspozicion, kaj trarigardis la urbon Plzeň.

## - Ĉu ekzistas vera esperanta stilo ? -

Studu bone la verkojn de D-ro L.L.Zamenhof, ĉar ili estas la ĉiama Fundamento por la lingva unueco de Esperanto. Se ĉiuj por-esperanto societoj traktos laŭ sia gusto la stilon de esperanto kaj se per-esperanto societoj nenian okupas sin-pri tio, la unueco de stilo en esperanto neniam iĝos fakto. Estas vere, ke nia Majstro eldonis Krestomation, kiel modelon de stilo, ankaŭ ke li konsilas en ĝia antaŭparolo al la verkontoj en esperanto pli ol unufojon ne tralegi, sed trastudi tiun libron, po akiri esperantan stilunuecon. Sed kion malmulte da esperantistoj faris tion? Estas eĉ gravaj esperanto-societoj kie la Krestomati mankas en la libroŝranko. Ĉu oni poste povas bone plenumi la mision de esperantopropagando?

## - El nia movado -

\+ GEKAMARADOJ, la kongreso montris al ni, ke ni devas ankoraŭ multe labori kaj propagandi, por ke nia ligo estu tiel forta, kiel ni ĉiuj deziras. Sed ne povas labori nur komitatanoj, sed vi ĉiuj, karaj gekamaradoj devas helpi al ni.
Nuntempaj politikaj cirkonstancoj plej bone montras al la esperantistoj kie estas por nia movado plej multe da laboro. Nuntempa aŭtuno estas por nia propagando la plej taŭga tempo, tial vi ne forgesu, ke en nia respubliko ekzistas ankaŭ laborista esperantista organizo, kiu bezonas ĉiurilate subtenon de esperantistoj. Propagandu konstante nian movadon kaj ligon. Anoncu al ni ĉiuj entreprenoj, kiuj estas en via regiono aranĝataj, sciigu, kiamaniere progresas ĉe vi la movade. Varbu novajn anojn al la ligo. Subtenu nian presfondon. Helpu al ni, por ke nia ligo havu venontjaro okaze de II. Tutŝtata kongreso mil da anoj.

\+ Manifestacio de soc. demokrata partio okazos 11. de septembro en Plzeň. La manifestacian marŝon de la festo partoprenos ĉiuj fakoj de la laborista movado. Ankaŭ la laboristaj esperantistoj partoprenos en tiu manifestacia marŝo tra la urbo kun devizo "Esperanto-Latino de demokratio" kaj kun esperanta standardo. Estas petataj ĉiuj gekamaradoj ke ili multnombre partoprenu tiun manifestacion, ĉar estas unufoje, kiun la laboristaj esperantistoj marŝos en sia propra trupo tra la stratoj antaŭ multnombra publiko. Gekamaradoj, ni devas propagande eluizi tiun manifestacion por ke ni atentigu la publikon pri pri nia ekzisto kaj pri niaj celoj. Ĉiuj partoprenantoj havu la esperantan insignon.
Ni kunvenos 11. de septembro je la 8. horo matene en Laborista domo Peklo en ejo de esperantistoj.

\+ La kunveno de liga komitato okazos 29. de septembro je la sepa horo vespere en la ejo de societo "Kulturo" Plzeň, Houšková strato 17. Ankaŭje tiu sama dato kaj ejo je la oka horo vespere okazos kunveno de redakcia rondo. Estas necese, ke anoj de la komitato eĉ de la redakcia rondo nepra ĉeestu.

\+ KULTURO – PLZEŇ: 25. de aŭgusto okazis en nia kunvenejo belega vespereto. Je simpla anonco en gazeto kolektiĝis ĉirkau 30 de esperantistoj el ĉiuj kluboj en Plzeň. Kaŭzo de tiu kunveneto estis vizito en nia klubo de australaj esperantistoj geedzoj Hanks el Melbourne, vojaĝantaj tra la Eŭropo. Bele ili rakontis pri sia vojaĝo kaj pri sia lando, estus dezirinde pli multe similaj vesperetoj.
La konversacioj de la societe estas nun denove regule ĉiusemajne jaŭde je la 7. horo vespere. Ĉiuj anoj vizitada regule la konversaciojn.

## - Ekster nia movado -

\+ 18a SAT-KONGRESO. Dum la 7. - 13. de aŭgusto okazis 18a SAT-kongreso en Bruselo, kun bela sukceso. Estis tie 659 da partoprenantoj el 16 landoj. El Ĉeĥoslovakio partoprenis du kamaradoj el Plzeň.
Venontjara kongreso okazos en Kopenhago. Invito de plzena SAT-rondo por 1940 efektivigi la kongreson en Plzeň, estis entuziasme akceptita.
La kongreso akceptis rezolucion, laŭ kio alvokas Laboristajn Esperantistajn Asociojn, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al Götenburka konvencio, por ke ili tion faru.

\+ La 30a ESPERANTO KONGRESO de Internacia Esperanto-Ligo okazis komence de aŭgusto en Londono al ĝi aliĝis el 30 landoj 1602 de partoprenantoj. El nia respubliko aliĝis 30 da gesamideanoj. Laŭ la akceptita rezolucio estas starigita speciala fako, kiu zorgos kaj pristudos la demandon "Esperanto en la lernejojn".

\+ En P l z e ň estas eldonita propagandilo pri la urbo en esperanta teksto. Kiu dezirus ĝin, skribu al esperantistaj kluboj en Plzeň.

\+ GVIDU KURSOJN LAŬ "PETRO". Ĉiu iom sperta esperantisto povas gvidi kurson laŭ praktika lernolibro "Petro" verkita en esperanto. Petro-lernolibro kostas Kč 6.--. La enhavo estas dividita en 32 artikoloj kun multaj ilustraĵoj kaj klarigoj.
Tridek du artikoloj formas kontinuan rakonton pri knabo de laborista familio. Ĉiun artikolon sekvas ekzercaro kun demandoj kaj vortaro. La ses elĉerpitaj eldonoj pruvas praktikan valoron de la lernolibro.
Kamaradoj instruantoj, provu ankaŭ vi "Petron" ĝi estas havebla ĉe SAT. Avenue Gambeta 67. Paris 20,
aŭ ĉe Esperanto-Plzeň, Houšková 17.
Malgrandaj sumojn oni povas sendi en poŝtmarkoj.

## - H U M O R O -

Antifaŝista bonhumoro.
/ el Popola Fronto /

Intuicia respondo: Generalo Franco vizitis lernejon. Post kelkaj demandoj al la lernantoj, li sin turnis al unu infano, kiu aspektis lerta.
- Se-vi estus mia filo, ĉu vi dezirus esti muzikisto?
- Ne, sinjoro ĉefgeneralo, respondis la demandito.
- Ĉu eble al vi plaĉas esti komercisto?
- Ankaŭ ne – denove diris la knabo.
- Ŝajne vi preferas esti bankiero aŭ militisto, ĉu ne?
- Ho neniel – trifoje ripetis la lernanto.
- Ĉu vi do preferas nenion? - demandis la ĉefgeneralo rigardante la infanon kun miro.
- Se mi estus via filo, mi ja volus esti . . . orfo, respondis la knabo.

El la Tria Regno: En Germanio oni intencas elekti alian blazonbeston. La nazo de la aglo ja estas pure hebrea, kaj la nomo memorigas pri iamaj marksistaj gvidantoj. Estas multaj kandidatoj por la posteno. Oni proponis i.a.: la kanguruon ĉar ĝi saltas plej alte kunmalplena poŝo; la hipopotamon, ĉar ĝi havas tre grandan buŝon, kiu tuj pensigas pri kelkaj germanaj eminentuloj; la kukolon, kiu ĉiam kantas sian propran laŭdon; la talpon, ĉar tiu estas blinda kaj prefere laboras subtere.

Laŭ "Nia Organo".

=

---

Venont numero de la "BULTENO" aperos lan de novembro kun aldono.